

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Vi aŭdas prelegaron de Charles Ecabert pri la svisa edukisto Henriko Pestalozzi.

A.- « Kiel dirite lastsemajne, la tragikaj kondiĉoj starigitaj en la kantono Nidvaldo de la revolucia milito reirigis Pestalozzi en 1799 al lia naturvokiĝa rolo : tiu de edukisto. Tie li faris verajn miraklojn, igante el etuloj malsanaj, maldelikataj, ofte malvirtigitaj aŭ sci-malavidaj, infanojn laboremajn, sciamajn, feliĉajn kaj ridetantajn. Ĉiuj raportoj interkonforme asertas :

Cl.- « *La infanoj prosperas, oni ilin ne plu rekonas, tiel pliboniĝis ilia aspekto.* »

A.- Post la abrupta fino de Stanz Pestalozzi, premigita pro laceco kaj doloro, memkompreneble ege konsterniĝis.

Cl.- Sed la ministro pri artoj kaj sciencoj, la juna profesoro Filibert-Albert Stapfer, el Brugg, opiniante, ke plej urĝe estas formi instruistojn kaj sekve malfermi porinstruistajn lernejojn, laŭ la ekzemplo de Francujo, ofertis ties direkcion al Pestalozzi, kiu rifuzis, preferante daŭrigi siajn priedukajn spertojn, certa posedi la esencajn verojn pri popola edukado.

A.- Stapfer komprenis kaj komisiis al Pestalozzi la elementan instruadon en la popollernejo de Burgdorf. Tie Pestalozzi provis ĉiuspecajn procedojn por simpligi la komencojn de ĉiu lernfako. Centjaron antaŭante li inventas kalkultabelojn kun enkvadratmetitaj punktoj, alfabetajn ludilojn kun bildoj, kartonajn literojn kun ruĝpentritaj vokaloj, ktp... En raporto al li direktita la lerneja komisiono agnoskas :

Cl.- « *La mirindaj progresoj de viaj gelernantoj klare montras, ke ĉiu infano estas kapabla por io, kiam la instruisto scipovas rekoni ties kapablojn kaj ilin kulturi kun vere psikologia arto.* »

A.- Sukceso estigas famon. Vizitantoj alkuras, inter la unuaj Herbart, kiu estis plenumonta veran pedagogian reĝecon sur la tutmondo. Oni asertis ĝis antaŭnelonge, ke Herbart kunportis en sian doktrinon la plejbonon de la pestaloziaj ideoj, sed ne prave.

Cl.- « *Neniam, deklaras Malche, disĉiplo pli bone perfidis majstron.* »

A.- Tri aliaj junaj edukistoj grupiĝis ĉirkaŭ Pestalozzi : Krüsi el Appenzell, Tobler el Basel, Buss el Ŝvablando.

Cl.- Stapfer, antaŭ ol forlasi la ministerion pri artoj kaj sciencoj por la legacio en Parizo, fondas la Asocion de la eduk-amikoj, cele helpi kaj subteni la agadon kaj spertojn de Pestalozzi. La Amikoj tuj postulis, ke Pestalozzi verku « *resumon de siaj principoj kaj procedoj* ». Tiel ni posedas tiun etan memuaron datitan de la 27-a de junio 1800, kie unuafoje Pestalozzi elmetas mallonge sian pedagogian metodon.

A.- Tiurilate nur du esencaj rimarkoj : unue stariĝas la pedagogio de la ebleco.

Cl.- « *Kiamaniere la infano atingos la edukcelon ne dependas de mia decido, sed de liaj fortoj kaj kapabloj.* »

A.- Pestalozzi envicigis pedagogion inter la eksperimentajn sciencojn, laŭ nia moderna vidpunkto. Due : la fundamenta postulo pri studo estas :

Cl.- « *Submetiĝu ĉiu lernprocedo al la eternaj leĝoj, laŭ kiuj la homspirito leviĝas el la sensaj intuicioj al la konceptoj.* »

A.- Temas pri baza nocio en la pestalozia doktrino. Tre ofte revenas ĉe li la vorto intuicio. Sed necesas ĝuste kompreni, kion li intencas diri per intuicio, ĉar ne ĉiam fidele oni interpretis lian penson.

Cl.- Intuicio estas aktiva, ne pasiva, sinteno al la objektoj kaj ties konkero fakte de la subjekto. El la realo la menso prunteprenas ne sian strukturon sed nur materion. Do superregas kaj antaŭestas interneco. Ni tie ĉi troviĝas sur la sojlo de la aktiva lernado.

A.- Lüthi, unu el la unuaj kunlaborantoj de Pestalozzi klarigas :

Cl.- « *En kio konsistas tiu metodo ? En tio, ke oni nur aletendas la manon al la naturo, en tio, ke oni el ĝi faras la veran instruanton. Kion la spertuloj jene esprimus, la metodo eliras el la intuicio kaj iom post iom kondukas la infanojn ĝis abstraktaj konceptoj. Ĝi enhavas alian utilon : nenie ĝi vidigas la instruiston kiel estaĵon de supera esenco ; simple, laŭ bona naturo, li ĉeestas, laboras, vivas kun la infanoj kiel kun samranguloj kaj ŝajnas, ke li lernas el ili, pli ol ili el li. »*

A.- La sekvantan jaron Pestalozzi publikigis alian gravan verkon : *Kiel Gertruda instruas siajn infanojn.*

Cl.- Tamen nenie temas pri Gertruda. La libro konsistas el 15 leteroj al Gessner, en kiuj Pestalozzi ree akcentas siajn principojn: « *Disvolvigis la infanan individuecon ekirante el la intuicio, ligante scion al povo, ĉion submetante al fin-celo de la edukado : disvolviĝo kaj uzo de la spiritaj fortoj. »*

A.- Unuafoje aperas en tiu libreto ideo de li tre ŝatata kaj senĉese praktikata :

Cl.- « *La tri ĉefaj rimedoj de la instruado estas nombro, formo, sono, alie dirite lingvo. Paroli, desegni, mezuri, en tiuj miljaraj agoj de nia specio, li vidis la kolonojn de la spirito. »*

A.- Sed stranga destino de ĉiam rekomencata kaj turmentata vivo, ĉar la burgdorfa prefekto depostulis por sia uzo la kastelon, kie loĝis Pestalozzi. Lia instituto devis plian fojon ŝanĝi lokon kaj en 1807 enloĝiĝi en la okcidenta romanda parto de la lando, en la urbeto Yverdon.

Cl.- Baldaŭ kreskis la nombro de la lernantoj, el ĉie oni alkuris, vizitis, admiris, laŭdis kaj imitis, ĝis akraj konfliktoj internaj kaj eksteraj estigis la definitivan disfalon.

A.- Returninte al Neuhof Pestalozzi ankoraŭ skribis du lastajn verkojn: *Cignokanto kaj Destinoj*. Li mortis la 17-an de marto 1826 kaj laŭ lia deziro oni enterigis lin piede de la lernejmuro en la vilaĝo Birr. Lia tombo estas nur kampoŝtono ombrata de rozarbeto. Lian voĉon ni lastan fojon aŭdu :

Cl.- « *Eduki ne estas kontraŭbatali la vivon, sed ĝin liberigi kaj naski la plej etan dian eron, kiu kuŝas en ni. »*

A.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-